


LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO
· FONDITA EN 1918 ·



Fondinto: "Avoto", Kufondinto: J. W. Leslie.
Honoraj Prezidantoj: "Avoto". Norman Booth, Kolonelo
D. H. Davis. L. J. Van Gulck.

Prezidanto: DOUGLAS MURPHY, 7, Constable Road Ipswich, Anglujo.
Sekretario: J. K. HAMMER, Taxustraat 7, Zaandam, Nederlando.
Kasisto: DAVID H. WITHEY, 21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool 22, Anglujo.
Ĉefredaktoro: PASTRO H. A. ROSBACH, Nergt. 37c, Kristiansund N. Norvegujo.

1918-



1968

50 JAROJ



OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

Volumo III, nr-o 25

dua jarkvarono 1968

Karaj amikoj!
Kun la plej bonaj deziroj por la somera skolta vivo mi elsendas tiun ĉi numeron. Samtempe mi pardonpetas, ĉar mi denove faris ŝanĝon, vere okulfrapan ŝanĝon, transigante

la triapaĝan "kapon" ĉi tien, kaj en nur duona grandeco. La amaso da materialo devigis min.

Via

Ham Flmund.

Hispana Misterio.

Jam dum kelka tempo ni fakte havis nenium kontakton kun nia N. R. en Hispanujo. Nun la afero iĝis ankoraŭ pli stranga, ĉar letero al li revenis kvankam la adreso estis tute korekta. Pro tio la C.K. decidis forstrecki lian nomon el la listo de N. R.-oj almenaŭ ĝis ni havos pliajn sciigojn. Kunlige kun ĉi tio ni devas informi vin, ke ni ĝis nun ne trovis eblecojn por oficiala SEL-kunveno dum UK en Madrido. Tamen ni ankoraŭ klopodas solvi tiun problemon. Ni esperas je minimume iu neoficiala SEL-kunveno, per kiu niaj membroj kaj amikoj povu renkonti unu la alian. La C.K. nepre invitas ĉiujn ĉeesti en tiu kunveno.

Samtempe ni volas rekti dankon pro laboro farita al nia hispana N.R. Kaj ni admonas lin kaj aliajn silentemajn amikojn doni vivsignon, ke nia laboro ne stagnu, sed progresu.

Korespondu kun Nov-Zelando.

Kune kun artikolo, al kiu ni bedaŭrinde ne trovis lokon, ni ricevis jenajn korespondopetojn:
Steven Crossley, 14 Ansac Road, 14 jara patrolestro. Intereso: fotografado, aviadiloj.
Barry Crossley, 11 jara komencanto, 14 Anzac Road.
Ian Cottrell, 172 Maunu Road, 13 jara. Poŝtmarkoj, moneroj. Esperanto-komencanto.
Rex Hodgson, 22 Mount Pleasant Road. 12 jara. Poŝtmarkoj, muziko, "go-karts" (malgrandaj motorveturiloj). Esp.-komencanto.
David Meyer, 196 Morningside Road, 12-jara komencanto. Muziko, ĉevaloj, modelaj aviadiloj.
La kvin supre menciitaj skoltoj ĉiuj loĝas en Whangarei, NovZelando. Ili estas aerskoltoj. Deziras kor. kun landoj ne angla-lingvaj.

Nigerio.

Ĉu la vivo kelkfoje estas malfacila?
Legu ĉi tiun komunikon el Nigerio!
"Nia semajno por gajni monon estis planita por Lagos en la lasta semajno de septembro, por aliaj partoj de nia landa dum la unua semajno en oktobro.
Tamen, partoprenantaj infanoj estis mortigitaj aŭ kaptitaj (pro enlandaj malfacilaĵoj)....Ni tial decidis fiksi novajn datojn: 23-28. oktobro.
(Mallonge laŭ oficiala Nigeria bulteno).

WP feb 68.

La S.E.L.-stando en la Mondekspozicio "Expo 67".

Montriĝas, ke en la stando disvendiĝis 1475 lernolibroj, disdoniĝis 26.000 flugfolioj, vizitis ĝin pli ol 50.000 personoj, kaj deĵoris en ĝi dum la duonjaro 45 gesamideanoj dum periodoj inter unu tago kaj 3 semajnoj.

Donaciĝis entute \$ 866, plejparte de kluboj tra Kanado, sed ankaŭ de unuopuloj kaj de la Usona SEL-sekcio; fotisto kaj eldonisto donis rabatojn; kaj plej grave: Ĉiuj deĵorantoj laboris senpage kaj eĉ pagis proprajn elspezojn. Fine restis eĉ iom da mono, uzota por la nova ekspozicio ĉijare, se eblos trovi lokon por Esperanto en ĝi; alie ĝi estos donata, parte al la Kanada S.E.L.-sekcio kaj parte al la centra SEL-organizo. Restas ankaŭ la aŭtomata projekciilo, 80 diaĵozitivuoj, ekrano, flugfolioj kaj SEL-aliĝiloj anglaj kaj francaj, kaj lernolibroj por skoltoj, anglalingvaj.

Ni deziras publike danki ĉiujn, kiuj helpis sukcesigi ĉi tiun informan agadon. Estis grava, ke en mondekspozicio la mondlingvo estu reprezentata. Kvankam ni ne gajnis multajn novajn membrojn, ĉar ĝa estis malpermesata varbi surloke, multaj personoj informiĝis pri Esperanto kaj Skolta Esperantista Ligo - multaj la unuan fojon.

U. Paul Ronald.

Kaj ni - la Centra Komitato kaj la redaktoro - ĉi tiu deziras ankaŭ doni la plenan honoron al la gesamideanoj kiuj havis la kuraĝon kaj la iniciaton aranĝi tion. Ni fieras, ke ni havas membrojn, kiuj tiel fidele vivas laŭ la devizo:

ĈIAM PRETA

Paul Ronald, nis helpa N-R en Kanado, malantaŭ la SEL-stando en la skolta paviliono ĉe la mondekspozicio.



'KVIZO' PRI B.P.

kopirajto MATTI LEIKOLA-PARTIO

traduko SEPPO TELLA-APK



1. La patro de B.P. estis profesoro ĉe Oxford Universitato. Lia fako estis
 1. teologio. x. geometrio. 2. geografio
2. Oni parolas multe pri "grandaj" fratoj de B.P., sed ĉu li havis pli maljunajn fratojn ol si mem:
 1. li ne havis x. li havis unu 2. li havis du fratojn.
3. Kiam B.P., kiel 19-jarulo, komencis sian militservon kiel oficiro, tio okazis en
 1. Hindujo. x. Sud-Afriko. 2. Aŝanto (en nuna Ganao)
4. B.P. estis fervora ĉasisto. Li eĉ skribis gvidlibreton pri ĉasado de
 1. leonoj. x. tigroj. 2. sovaĝaj porkoj.
5. La regimento de B.P., kies Honora Membro kaj Komandanto li poste fariĝis, estis
 1. 15a dragonoj. x. 13a husaroj. 2. keŭzimeroj.
6. Lordo Edward Cecil estis sincera amiko de B.P., sed li estis ankaŭ
 1. asistanta estro de B.P. en la unua skolta tendaro en Brownsea Island en 1907.
 - x. la homo kiu inspiris B.P. prilabori la ideojn pri la skolta movado por la libro "Skoltado por Knaboj"
 2. la kreinto kaj estro de knaba sekcio en Mafekingo.
7. Post la bura milito B.P. pasigis kelkajn jarojn en Suda Afriko (1900-1903), kie li i.a. organizis la Rajdantajn Policianojn de Suda Afriko (Scout African Constabulary). La moto de tiu grupo:
 1. Estu preta. x. Estu justa. 2. Ĉion por Hejmlando.
8. Kenneth McLaren povas ŝajni nekonata. Tamen li estis
 1. donacinto de Gilwell-Parko. x. sekretario de B.P. en la unua skolta ĉefstabo. 2. asistanta estro en la unua skolta tendaro en Brownsea Island en 1907.
9. La libro "Skoltado por Knaboj" aperis 1903 en
 1. kvar libretoj. x. ses libretoj. 2. ok libretoj.
10. La unua lando, kien skolta movado venis ekster Brita Imperio:
 1. Danlando. x. Francujo. 2. Ĉilio.
11. En la tendaro de Brownsea Island la nomoj de la unuaj patroloj de la mondo estis
 1. kukuloj, kornikoj, amasoj, garoloj.
 - x. numenioj, korvoj, lupoj, bovoj.
 2. vulpoj, lupoj, leonoj, ursoj.

KUKULO
Krio: "Kuk-Ku"
Koloro: Griza.



Li staris dum momento, ĉirkaŭrigardis, aŭskultis. - Jen la senhoma vilaĝo kiu atendas lin.

Kate li rapide venis trans la barilon. Baldaŭ la laboroj lin gardis kontraŭ rigardoj el la strato, kaj li kuris al la vilaĝo. La herbo sub liaj piedoj mallautigis la paŝojn.

Estis evidente, ke ĉio estis bone planita. Sed hezito li sin movis laŭ la verando-ŝtuparo al la biblioteka pordo. En la mano li tenis ŝlosilon. Ĝi funkciis, la pordo malfermiĝis.

Denove li estis inter la grandaj librobretoj. Estis prema silento ĉirkaŭ li, li preskaŭ povis aŭdi siajn korobatojn. Kiam aŭto preterpasis la domon, li nevole kaŝis sin en angulo. Poste li priridis sian propran timon, sed la rido sentiĝis nenatura, kaj ĝi timigis lin. Ĉu iu aŭdis ĝin? La servistinoj, ĉu ankaŭ ili estas for, aŭ ĉu ili dormas ie en la proksimo?

Li prenis sian elektran torĉon. Estas io trankviliga en la nura teno. Lumstrio venis de ĝi kaj sin movis en la ĉambro kiel vivanta estaĵo. Ĉie ĝi renkontis librodorojn. Per kelkaj paŝoj Håkon estis ĉe la raraj unueperaĵoj. Li pezis kelkajn per sia mano, sed remetis ilin. Li memoris ion, kion Harald diris pri la prefero de ŝtelistoj: Mono, oro kaj argento.

Denove la lumstrio ekmoviĝis. Nun ĝi haltis ĉe la pordo de la laborĉambro, la ĉambro kie la riĉa direktoro prilaboris siajn komercaferojn dum li ne estas en la oficejo. Tie eble estas io valora, eble mono... Sed tiukaze certe en fortika ŝranko.

Tamen la knabo iris tien. Io tiris lin, li ne povis rezisti. Al granda kverka skribotablo li iris. Ekster tiu la ĉambro estis tiel nemeblita ka li sentis malvarman venteton. Li spiregis.

La skribotabla tirkesto estis neŝlosita kaj facile malfermebla. Li traserĉis per gantovestita mano. Jen...

Li sentis ŝoketon kiam li per la lumstrio legis sur koverto: "500 kr. al la kolekto de Aftenposten pro "La tri infanoj kiu perdus sian patron sur la maro" - de H.T."

Håkon prenis la koverton kaj sentis la monobiletajn knari en ĝi. Dum momento li tremblis pro superkreda timo. Iu supernatura forto devas esti lin gvidinta, ĉar li ne suspektis, ke estas iu mono en la tirkesto, kaj tamen li iris senhezite rekte al ĝi, malfermis ĝin - kaj trovis la koverton. Tio ŝajnis esti iu signo de la sorto, kiu rakontas, ke li ĉiam estu legorompisto, malamiko de la socio. La aventura brilo tute malaperis, restis nur prema sento de honto kaj senvaloreco.

Ĉu li lasu la koverton?

"Panjo..." li senespere flustris kaj metis ĝin en internan poŝon. Li lasis la tirkeston malfermita, stumblis tra la biblioteko kaj apenaŭ memoris fermi la pordon post si.

Dum li atingis al la arbetaro, aperis homo antaŭ li. Li nur neklare vidis ĝin, sed frapis sovaĝe. La alia falis kaj kuntiris lin en la falo. Dum momento ili interbatalis sur la herbaro.

"Håkon, estas nur mi," la alia flustris.

"Jumbo!!" - "Jes".

Estis longa paŭzo. "Vi do komprenis ĉion?" "Jes..."

Surstrate biciklisto haltis. Estis viro de "Garda societo". Li estis vidinta ion moviĝantan en la ĝardeno. Dum momento li fikse rigardis tra la mallumo. Ĉu voĉojn li aŭdis? Li elpoŝigis grandan ŝlosilon. Unu taŭgis al la ĝardena pordo.

Håkon la unua lin vidis.

"Jumbo, ni estas viditaj."

La gardisto venis rekte al ili. Li ankoraŭ ne vidis ilin, sed se ili restos, li baldaŭ tretos sur ili. Estus neeble ekbatali,

ĉar li estis vera giganto. Li estis inter ili kaj la ĝardena pordo, kaj se ili provus ĉirkaŭiri, ili alvenus sur malferman terenon, kie li tuj vidus ilin.

Denove montriĝis, ke la nervoj de Jumbo ne sufiĉis al tia situacio. Li vidis antaŭ si policon, klarigojn kaj malliberejon kaj volis ekkuri. Sed Håkon tenis lin tiel forte je la brako, ke li preskaŭ vevokis.

"Sekvu min!"

Lia voĉo estis tiel aŭtoritata, ke la knabo tuj obeis. Surventre ili serpentumis tra la herbo. Ili sekvis la arbustojn laŭ la ĝardena vojeto oblikven al angulo de la vilao.

La gardisto pasis tre singarde. Oni ja ne povas scii, kiajn homojn oni trovos - se estas homoj. Li povis vidi preskaŭ la tuton. Ambaŭflanke kreskis fruktarboj. Ekster tio estis nuraj herbejoj. Nur arbustoj iom fore povus doni kaŝejon... Eble ili sin kaŝas malantaŭ tiuj por povi transengrimpi al apuda ĝardeno? Li forĵetis la singardemon kaj ekkuris.

Kiam la knaboj aŭdis lin veni, la distanco inter ili kaj la ĝardena barilo estis ĉirkaŭ dudek metroj. Ili povus sukcesi!

Sammomente aŭdiĝis laŭtvoĉa interbabilado. En la najbara vilao estis festeneto, kaj nun kelkaj gastoj ekforiris. Kaj la gastiganto sekvis ilin al la ĝardena pordo. Li konas la knabojn laŭ vido, kaj neeviteble li ekvidos ilin, se ili provos penetri tra lia ĝardeno. La vojo estas neebla!

Maldekstre de la knaboj estis granda hundodomo. Iam ĝi estis loĝejo de St. Bernharda hundo. Nun malplena. Eble...

La gardisto haltis dum momento ĉe la arbustoj. Se li estus tuj iranta, li vidus krurojn malaperi tra la nigra inira truo de la hunda domo. Nun la verando kaŝis ĝin. Li observis ĉion. Neniu estis videbla. Kaj li daŭrigis sian vojton - al la barilo.

La knaboj ektimis dum li pasis. En la kaŭra pozicio estis preskaŭ neeble ne moviĝi. Kaj la scio, ke ili estas tute sendefendaj, ne pliagrabilis la situacion. Se la gardisto trovos ilin, kontraŭstaro estos vana. Kaj poste ili estos perditaj. Oni trovos ĉe ili ŝtelitaĵojn, kaj Håkon havas ŝlosilon al la vilao. Eĉ la nekulpa Jumbo ne povos eviti la akuzon. Denove li vidis la teruraĵojn: Polico, malliberejo. Kiom stulte li agis, dum li intervenis en tio ĉi!

La gardisto ekpensis, ke li miskomprenis la sonojn. Tamen li ne volis foriri sen esplori ĉion. Li iris al fenestroj kaj al pordoj, sed trovis neniujn signojn pri krimo. Dum tiu inspekta rondo li ankoraŭfoje pasis la hundodomon, sed ne rigardis en ĝin. Iom ĉagrene li forlasis la ĝardenon kaj forbiciklis.

Sed ankoraŭ daŭris ĝis la knaboj riskis forlasi la kaŝejon. Kiam ili fine staris sur la herbejo, Jumbo metis sian manon sur la brakon de Håkon. "Remetu la libron," li petis.

"Libron?"

"Jes. Ĝi estos eĉ pli malfacile vendebla ol la ponardo."

"Nu...Mi ne prenis libron. Mi intencis tion, sed mi komprenis, ke estos malfacili ĝin vendi. Tial..."

"Tial?"

"Tial mi ŝtelis monon," diris Håkon malmole. "Kaj eĉ ne de la riĉa direktoro Torpe - ne, de tri senpatraj kompatinduloj"

Li diris tion malmole, sed malantaŭ la vortoj estis lia senespero.

Jumbo ekmiris, ĉu la streĉo estis troa al la amiko.

"Mi ne komprenas...?"

"Nu, rigardu."

Håkon prenis la koverton kaj metis lumstrion sur ĝin: "500

kr. al la kolekto de Aftenposten pro "la tri infanoj kiuj perdis sian patron sur la maro" - de H.T."

Kaj jen la mono. Kvin centbiletoj."

"Håkon, vi devas remeti ilin."

"Mi bezonas la monon. Ni havas nek manĝaĵojn nek medizinojn."

"Mi ne lasas vin ĝis..."

Sed Håkon facile liberigis sin.

"Vi estas bona ulo, Jumbo, kaj vera amiko. Sed nun ni devas foriri, se ne ne deziras plurajn malfacilaĵojn ĉi-nokte."

Jumbo timeme ĉirkaŭrigardis. Tiam li sekvis la amikon. Nun li timis Håkon - kaj domaĝis lin; li preskaŭ malamis lin - kaj li admiris lin. Li volis igi lin remeti la monon kaj helpi lin, sed ne nur ĉar Håkon agis nedece. Nun li scias - pro si mem li volis tion. Nu, eble... ne, ĉefe pro si mem.

La idolo kiun Jumbo kreis el si mem, ekdisfalas. Kaj bone.

Sed en la herbo, kie la knaboj ekinterbatalis, kuŝis etaĵo kaj atestis pri la vizito, same bone kiel vizitkarteto.

ODD FARIĜAS DETEKTIVO.

Harald havas gravmian aspekton pro sekreto la postan tagon. Jam en la unua libera kvaronhoro li forprenis Jumbon en la lerneja korto.

"Ĉu vi scias, esti ŝtelistoj ĉe ni ĉi-nokte!"

Lia voĉo estis plena da ĝojo, kaj li rigardis la vizaĝon de la amiko por ĝui lian timigon. Sed Jumbo reagis neatendite.

"Ŝtelistoj?" li diris pala kaj nekomprene.

Harald estis esperinta je plia intereso. Li devas plikolorigi ĉion.

"Ni ekvidis tion hodiaŭ matene. Kiam paĉjo venis en la laborĉambron la tirkesto de la tablo estis duone malfermita. Kiam li esploris ĝin, mankis 500 kronoj. Sed la mistera, vi sciu, estas ke fenestroj kaj pordoj estis ŝlositaj. La ŝtelisto devas posedi falsan ŝlosilon."

"Ĉu vi informis la policon?"

"Patro telefonos el la oficejo. Sed ili certe ne reagos, kiam nur 500 kronoj estas ŝtelitaj."

Harald ŝajnis vere bedaŭri, ke la sumo ne estas pli granda. Estas pli da aventuro kaj brilo kiam temas pri grandaj sumoj aŭ netakseblaj dokumentoj.

Post la lernejaj horoj li ankaŭ dividis la sekreton kun Håkon kaj Odd. Odd tuj entusiasmigis. Li demandadis kiel vera Sherlock Holmes kaj ekhavis ĉiam pli profundaĵn sulkojn ĉe la nazo. Oni povus kredi, ke li jam sekvas la ŝpurojn.

"Se ni kvar povus esplori la aferon kaj kapti la krimulon - aŭ krimulojn," li fine diris.

Harald ŝatis la penson. "Bonege. kuniru nun, kaj ni faros etan esploron surlokan."

Li atendeme rigardis la kamaradojn. Håkon kaj Jumbo komence volis eviti tion, sed ekkomprenis la valoron de tia vizito. Eble ili lasis ŝpuron, kiun ili nun povas forigi. Ne ĉiuj krimuloj ricevas tian ŝancon...

Jumbo nevole pripensis kun kia ĝojo li akceptus tian situacion se li ne vere scius, kio estas okazinta dumnokte. Certe li estus same entuziasma kiel Odd nun. Li fabelus pri mistikaj banditoj, pri ululoj, interkonsentitaj rekonovortoj kaj singardaj paŝoj en la nokta mallumo... Nun li sentis alian, turmentan streĉon. Ĉu ili trovos ion - kaj ĉu oni malkovros ilin?-

Nur kiam ili estis en la granda antaŭĉambro Harald ekpensis, ke ili nedece kondutas. Se la polico ankoraŭ ne estis tie, ili ne rajtas tuŝi ion ajn. Li unue iris al la patrino. Reveninte li povis rakonti: Paĉjo ĵus telefonis el la oficejo. Kaj li ĵus sin turnis al la polico. Venos unu post duonhoro, - mi ne scias kion ni faru -. Ho, ni tamen faru serĉeton, sed tiam lasu ĉion netuŝita. Ni laboru rapide!

Ili tuj komencis. La biblioteko kaj la laborĉambro estis laŭ plej bona krimlibra maniero serĉataj, eĉ cigaredero en cindrujo devis toleri ardan, serĉeman rigardon de Odd. Sed estis Håkon, kiu ekvidis, ke libroj en la bretaro oblikvis. Li rapide alĝustigis ilin...

Fine Odd atingis la verandopordon. Ĝi nun estis malfermetita. La ŝlosilo estis en la ŝlosilo, interne.

"Harald, ĉu la pordo estis ŝlosita hodiaŭ matene?"

"Jes." "Kaj la ŝlosilo?" "Ĝi kuŝis sur la apuda bretaro kiel kutime."

"Hm." Estis oceano da pripenso kaj nekaŝita scio en tiu sono.

"Ĉu vi povas fidi la servistinojn, Harald?"

"Ili estas ekster ĉiu suspekto."

La knaboj uzis frazojn de libroj. Håkon kaj Jumbo konsciis tion kaj ridetis. Ankaŭ ili kondutis tiel, se ne...

Odd rigardis la ŝlosilon. "Tute ordinara ŝlosilo. Ni iru en la ĝardenon."

Tie la esplorado fariĝis eĉ pli akurata. La nokto estis seka kaj piedpostsignoj ne troviĝis. Sed la ŝtelistoj povus esti perdinta ion.

Odd surpriziĝis. Antaŭ li en la herbo estis io. Li prenis ĝin. Ruĝa, malkara fontoplumo. En la tenilo enskrapitaj literoj H.M. Li eĉ ne bezonus vidi la literojn. Estis la fontoplumo de Håkon Mørk.

Vera ekcitiĝo vibris tra la korpo de la knabo. Li konis Håkon pli bone ol la plimulto kaj sciis, ke oni povas atendi ion ajn de li. Li metis la plumon en la poŝon kaj paŝetis al la kamaraĉjo kun sensignifa mieno.

"Kiam vi revenis hodiaŭ nokte, Harald?"

"Ĉirkaŭ la dua."

"La ŝtelisto do estis ĉi tie antaŭ tiu tempo. Kiu sciis, ke vi ne estis hejme?"

"Ho, nefacile diri tion."

Kun seriozega mieno de juĝisto Odd sin turnis al Håkon, kiu esploris surgenuje ĉe la hundodometo.

"Jen, tiu ulo ŝajnas nefidinda. Tre nefidinda! Li certe sciis ke la domo estis senhoma?"

"Jes, vere," ridetis Harald. "Mi rakontis tion al li hieraŭ."

Jumbo sentis malvarman torenton laŭ la dorso. Certe ili ŝercis, sed... Ho, ke li ne povis deteni la amikon de la krimo! Nun li iel mem kulpas.

Håkon nur priridis la turnon de la interparolo, sed Odd notis ke la rido estis iom deviga. Kelkajn minutojn poste li denove demandis: "Ĉu vi estis ĉi tie ne la ĝardeno antaŭe, Håkon?"

"Ne, sinjoro detektivo!"

"Nu, ne - ne?" pensis la juna esploristo.

La resto de la esploro gvidis al nenio. Kiam ili foriris de la ĝardeno, venis la policisto. Estis ronda, malgranda, ĝentil-aspekta ulu. La knaboj scivolaj rigardis lin.

"Vi apenaŭ trovos ion" pensis Håkon. "Mi devus esti perdinta la plumon aliloke."

12. La unua skolta gazeto "The Scout" ekaperis
1. aprile 1908. x. aŭguste 1909. 2. novembre 1910.
13. Edziĝante B.P. havis
1. 45 jarojn. x. 50 jarojn. 2. 55 jarojn.
14. Al li naskiĝis
1. unu infano. x. du infanoj. 2. tri infanoj.
15. B.P. estis la unua ĉefskolto de anglaj knaboskoltoj, sed la unua ĉefskoltino estis
1. Agnes, fratino de B.P. x. Olave, edzino de B.P. 2. fraŭlino Juliette Low.
16. La hejmo, kie B.P. longe vivadis en Anglujo nomiĝis
1. Gilwell Park. x. The Outspan. 2. Pax Hill.
17. Kiam B.P. fariĝis Lordo "of Gilwell" en 1929, li prenis kiel la ĉeftemo de sia blazono
1. la skoltan lilifloron sen "Rideto de Kim". x. la lilifloron kun "Rideto de Kim". 2. neni un el ĉi tiuj du.
18. La naskiĝtago de B.P. estis la 22a de februaro, sed li mortis
1. 8an de januaro. x. 25an de marto. 2. 13an de aprilo.
19. B.P. estis
1. dekstramana. x. maldekstramana. 2. ambaŭmana.
20. La tomoŝtono de B.P. en Kenio portas enskribon, kiu en Esperanto estas:
1. Estu preta - ĉiam preta. x. Se vi serĉas memorsignon, ĉirkaŭvidu. 2. Ni igu la mondon pli bona ol ĝi estis je nia naskiĝo.

Kaj nun ni invitas la legantojn ensendi respondojn al tiuj demandoj, kaj unu el la sukcesintoj ricevos malgrandan premion. Limdato: ĉiuj respondoj devas atingi la redaktoron antaŭ la deka de aŭgusto.

NOVA AMIKO EN LA RONDO

Jam dum kelkaj monatoj nia amiko Pietro Ferrara ekŝiĝis kiel Nacia Reprezentanto por Italujo.

Fakte jam de la komenco Pietro nur parte povis doni siajn fortojn al S.E.L. Almenaŭ: Laŭ tiuj kondiĉoj li akceptis la oficon. Nun ni povas kontroli tion, kaj povas nur esti dankaj pro la laboro kiun Pietro faris. Li certe restos ano de nia amikaro.


Lia lasta ago estis serĉo de nova N.R. Jen: Instruisto Franco Tulone, skoltestro de l.a grupo en Sciacca. Bonvenon al nia rondo. Tio donu al vi kaj al ni ĝojon kaj feliĉon!

Adreso: Via Frangipane 8, I-92019 Sciacca, Italujo.

Ni speciale fieras: Franco Tulone - kun siaj skoltoj - faris valoran laboron en la helpado post la tertrema katastrofo en Sicilio, kio estis honore merciata en la gazetaro.



ESSEX



IDEO AL LA KIRISTO

6.a Essex Internacia Ĵamboreo, Southend, Britujo, 27/7-3/8 1968.

La aranĝoj por la ĵamboreo, en kiu Esperanto estos dua lingvo, bone marŝas. Ĉiuj skoltoj, kiuj estos studintaj Esperanton, ricevos de SEL specialan insignon por sia uniformo. Inter tiuj estas la Organizanta Komisaro Tom Parrinder kaj pluraj el lia tendara stabo. La menuoj estos nur en angla kaj Esperanto, tendaraj afiŝoj same. S-ro Parrinder gvidos diservon kun legaĵoj en Esperanto. La Ordo de Diservo estos presita en angla kaj Esperanto. La ĉiutaga ĵurnalo de la ĵamboreo enhavos esperantan rubrikon, la radiostacio uzos Esperanton en sia oficiala manlibro. Ankaŭ en la tendarfajraj kantadoj oni uzos Esp. kantojn, kaj la oficiala ĵamborea kanto, speciale verkita en Esp. de nia prezidanto, estos ĉiutage disaŭdigata per laŭtparolada sistemo, kaj en la konkursoj oni multe uzos nian lingvon.

D-ro Laszlo Nagy, Sekretario Ĝenerala de la M.O., sendis al S.E.L. salutojn "Mi interesiĝis pri ĉiuj detaloj donitaj de vi..mi deziras al viaj klopodoj ĉiun sukceson.

Salutojn al la ĵamboreo oni sendu al s-ro Parrinder, Scout Jamboree "Belchamps", Hawkley, Heckley, Southend-on-Sea, Essex, Britujo.

V Dio vokas en pluraj manieroj.
O Foje vi aŭdas lian vokon en
K Ĉu la plena kantado de preĝ-
O vi atendas kiam vi ejaĵaj sonorilegoj. Foje
K vi aŭdas ĝin en la
O aŭdas Lian vokon? silenta susurado
K Li volas paroli kun de la arb-
O vi - en la diservo, en la aro.
K preĝo, per Sia vorto, per
O Sia naturo. La beleco de la
K kreitaĵo estas en si mem voko.
O Kaj ni - skoltoj - ne rajtas mal-
K atenti tiun vokon.
O Dum vi aŭskultas, vi baldaŭ aŭdas, ke Li
K havas taskon al vi. Taskojn ni nur vi
O povas plenumi. Se vi ne faros ĝin, ĝi ne
K estas farata.
O Skolto: Estu preta - fari vian devon al vi.
K Dio



Bonvolu skribi leteron al

John Adkins, sekretario de "Roland House" en Londono. Adreso: Roland House, 29, Stepney Green, London E.1.

Ecuko Mijazaki, 14-jara knabino. Adreso: 1010-1 Kamisatoni, Haruna, Gumma-Ken, Japanujo. Ŝi deziras utiligi ĵus lernitan lingvon per korespondo.

Lupido en Anglujo volas interŝanĝi poŝtmarkojn kaj aliajn aĵojn kiu(j) interesas knabojn kun lupidoj en ĉiuj landoj. Adreso: Sendu leteron al lupido Donaldson al John Adkins, kies adreso troviĝas supre.

Roberto Ferreira Caxias, 21-jara studanto. Ŝatas papiliojn kaj poŝtmarkojn, kaj volas kor. kun ĉiu lando pri skoltado, geografio, folkloro. Adreso: Sendu per la adreso de nia N.R. (vi forgesis, Roberto!) en Brazilio.

Manoel Brandão Ferreira, skoltestro, 21-jara, studanto. Deziras kor. kun ĉiu lando pri siaj ŝatokupoj: skoltismo, ĝenerala historio. Adreso: Avenida Generalissimo Deodoro 1526, Faculd. de Farmácia, Belém, Pará, Brazilio.



DUMONATA INTERNACIA GAZETO
PRI BIBLIAJ KAJ ORIENTAJ STUDOJ
I - 48100 RAVENNA - PIAZZA DUOMO 4

Kun danko kaj fiero ni akceptis specimenon de la altkvalita teologia fakrevuo Biblia Revuo, kun artikoloj pri "Proto-Luko", "Lingvo kaj religio laŭ la Biblia vidpunkto" kaj "Ha-'Aj".

NOTOJ

La informo pri oficiala Esperanto-teksto sur vizitkartoj de nederlandaj diplomatoj bedaŭrinde estas falsa.

El Ĉeĥoslovakio: La skolta movado nun estas renovigata. Mahnovaj funkciuloj reprenas la laboron, kaj inter la junularo estas intereso. La 28an de aprilo skoltoj renkontiĝis sur monto Ivančena kie estis mortpafitaj skoltestroj. Ĉiu skolto kunportis ŝtonon, kaj ĉar alvenis granda amaso da geskoltoj, rapide kreskis tuta monumento honore al tiuj mortpafitoj.

C.S.Otto, antaŭa sekretario de nia ligo kaj N.R. de Usono, kore gratulas la Ligon pro ĝia jubileo kaj salutas ĉiujn, kun kiuj li tiam tiel feliĉege kunlaboris! Bedaŭrinde tempo mankas por pli aktivaj servoj al SEL.

Skoltoj germanaj el Rheinland-Pfaltz vizitos la ĵamboreon en Essex, Anglujo. Kun helpo de Germ. Esp. Junularo 12 nun lernas



PRESAJO

Naciaj reprezentantoj:

- Aŭstralio: S-ro S.H. Milligan, 274 Mont Albert Rd., Surrey Hills,
E 10, Victoria.
- Brazilo: S-ro Euclides C. Soares, Av. Almirante Tamandare 979,
Belem, Para.
- Eritujo: S-ro C. Bardsley, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs.
- Danlando: S-ro Sejer Holgersen, Ejnarsvej 99, Lyngby.
- Finlando: S-ro Seppo Tella, Pieni Roobertink, 4-6M70, Helsinki 13.
- Hispanujo: S-ro Pedro Marqueta, Avenida de Valencia 32, Zaragoza.
- Italujo: S-ro Franco Tulone, Via Frangipene 8, 92019 Sciacca,
Agrigento.
- Japanujo: S-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K, 16,
Suekirotyo Kitatu, Osaka.
- Kanado: S-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest, Ont..
- Helpa N.R.: S-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro,
Quebec.
- Kongo: S-ro Paul Deloin Nzemba-Paku, Kalembелемbe no 225,
St. Jean, Kinshasa.
- Nederlando: S-ro J.K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam.
- Norvegujo: S-ro H.A. Rosbach, Nergt 37c, Kristiansund N
- Portugalujo: S-ro J.P. de Melo, Rua Jacinto Nunes 17-3^oDt^o,
Lisboa I.
- Svedujo: S-ro Curt Bohman, Fack 7, Högen.
- Usono: S-ro Ken Collins, 433 St. Dunstan way, Winter Park,
Florida, 32789.

